



Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place Gaston Pailhou
37000 Tours
esperanto-touraine37@wanadoo.fr
<https://esperanto-tours.legtux.org/>

ENHAVTABELO	Paĝoj	LA PARKO DE ARON
Kiel ĉiujare Gérard kaj Jeannine vojaĝas dum siaj ferioj. Ĉifoje ili vizitis la parkon de Aron. Ili invitas vin akompani ilin en ilia vizito de tiu flora parko. Certas, ke ilia detala kaj interesege raporto pri tiu belega loko de okcidenta Francio dezirigos al vi viziti ĝin.	1 kaj 2	Dum niaj ferioj, la dekan de junio 2021, ni vizitis la parkon de Aron, survoje inter Saint Jean de Monts kaj Luçon en Saint Cyr en Talmondaïs. Tiu vasta parko estas famkonata pro siaj lotusoj ; bedaŭrinde, kiam ni iris, ili ne floris. En tiu parko estas ankaŭ pastra ĝardeno kaj rozejo. Ni tradukas la klarigtabulojn de la parko. LA LOTUSO NELUMBO NUCIFERA La lotuso estas unu el la plej malnovaj kultivataj plantoj kaj estas unu el la plej perfektaj en la mondo. Ĝi estas konsiderata kiel « sankta floro » en budha religio ĉe Japanio, Ĉinio, Tibeto, Hindio, Laoso, Tajlando... Florado : fine de junio ĝis fine de oktobro laŭ la varmeco.
Jan Pierre estas granda amanto de marŝado. Pro la malfacilaĵoj kaŭzitaj de la kovim 19 ne eblis iri eksterlanden. Do li elektis Bretonion. Li rakontas al ni sian piediradon el Lorient al la duoninsulo Quiberon.	Paĝoj 3 4 5 6 7 kaj 8	Tiu belega floro estas ankaŭ manĝebla ; en la aziaj landoj, ĝiaj verdaj folioj estas salate gustumitaj, ĝiaj grajnoj sekigitaj, rostitaj, sukeritaj havas la migdalguston, ĝiaj radikoj pecigitaj estas rostebaj kaj el ili oni povas fari farunon ; la stamenoj estas uzataj por parfumi la teon. Ekde la maja monato aperas la netralasivaj folioj kaj matene portante gutetojn. Unue, kiel kuŝantaj sur la akvo, la rondaj folioj disvolviĝas, pliampleksiĝas kaj poste altiĝas. Iaj folioj estas diametraj je 1,20 m kaj la floraj butonoj estas 2,50 metrojn altaj (sub la salikoj). La lotusa floro matene malfermas sian malhelan rozkoloran korolon kaj eligas dolĉan parfumon. Je suna subiro, la petaloj blankaj kaj delikate orlitaj de rozkoloro falas. Tiam, oni observas la etan flavan kapsulon portantan grajnoj verdiĝantajn. La kapsulo dikiĝas ĝis atingi diametron je 15 centimetroj. Kiam estas freŝa vetero, la floro povas daŭri 2 ĝis 3 tagojn maksimume. Post fekundo, la floroj produktas fruktojn en formo de
Por fini la lastan turlandan lukon de la jaro 2021 Jean-Mary prezentas du amuzajn rakontojn.	Paĝo 8	

Ŝprucrozo. La brunaj grajnoj klare aperas en la kavo de la loĝietoj. La lotusaj fruktoj estas uzataj en la sekaj bukedoj. Lotusaj semoj 2000 jaraĝaj estis malkovritaj ĉe Japanio en 1951. Semitaj, ili floris.

Pri La lotuso ĝenerale

Vorto el latina deveno, la lotuso signas plantojn de la familio de fabacoj ;



tiu genro entenas 2 specojn de plurjaraj, ĉeakvaj, kadukaj plantoj. La lotuso facile diferencas de la nimfeoj ; fakte ĝiaj folioj kaj floroj estas supre de la akvo sed ne kuŝas sur ĝi.



En mitologio, la lotuso havas sakran karakteron. En multaj religioj, ĝia floro estas konsiderata kiel ofero. En Hindio, la hinduismo konsideras ĝin kiel universan naskiĝlokon

: « Patrino de la tuta kreado ». Ĝia tigo

estas la monda akso, sur kiu la Tero kuŝas.

Brahmao, ĉefa dio de la hindua panteono naskiĝis ĉe la lotusa koro. Ĝi ankaŭ estas la budhisma simbolo : laŭ la legendo, Budho aperis flosante sur lotusa folio.

Krome, ĝi simbolas la etapojn de la homa spirita progreso.

Ĉe Japanio, ĝi estas la natura diino Quanswon, kiun oni retrovas sur lotusa floro.

En la flora simbolo, ĝi estas la bildo de la pureco kaj de la perfekto.

LA PASTRA ĜARDENO

Ĉefaj karakterizaĵoj de la pastra ĝardeno

Origine pastra ĝardeno estas ĉirkaŭbarita ĝardeno, apudestanta la pastrejon kaj destinata por provizi la parokestron per legomoj, fruktoj kaj plukotaj floroj por ornamo la preĝejon.

La floraj kaj legomaj plantejoj estas ĝenerale organizitaj kvadrato, svarmantaj kaj ofte borditaj per buksoj. La pastra ĝardeno karakteriziĝas ankoraŭ nun per gaja vegetala svarmo interne de ĉiu kvadrato, kun floroj apud legomoj kaj abundeco da koloroj kaj aromoj.

La arboj estas unue fruktarboj aŭ ankoraŭ floraj arbustoj, el kiuj la branĉetoj povas fariĝi pompaj bukedoj.

Tipaj vegetaloj de pastra ĝardeno

La vegetaloj de tiuj ĝardenoj estas tradiciaj vegetaloj, ekskutimaj specoj ofte parfumitaj ktp. La ekzotikaj plantoj ne havas lokon ĉi tie !

Floroj

En tiu ĝardeno plej ofte troviĝas :

*jarfloroj sen pretendemo, kiuj facile semiĝas kaj sole resemiĝas, kiel la kalenduloj, la tropeoloj, la nigeloj, la kosmosoj, la kaliforniaj papavoj, ktp.

*iuj staŭdoj aŭ bulboj kun eksmoda ĉarmo, kiel la peonioj, la floksoj, la mariaj koroj (Iamprocapnos spectabilis, familio de papavacoj) kaj la madonaj lilioj.

*malnovaj rozoj, preferinde parfumitaj.

*floritaj arbustoj : forsitio, ribo, viburno kun neĝkoloraj buloj, ktp.

Legomoj

Tradicie, la pastra ĝardeno estas plantita per multnombraj specoj da ĝardenplantoj : tomatoj, salatoj, brasikoj, cepoj, melongenoj, rabarboj, ktp. Se vi ne deziras fari legomĝardenon, vi tamen povus havi kelkajn palisgrimpajn fazeolojn kaj kelkajn plantojn de kukurbacoj kurantaj inter la floroj.



Marŝado tra Morbihan, Bretonio far Jan Pierre

Saluton ! (Demat en bretona lingvo-Bonjour en franca lingvo). La bretonaj vortoj plaĉas al miaj bretonaj amikoj, esperanto, ĉar mi parolas iom esperanton, kiam mi piediradas tra la mondo...t.e. neniam.

Aĉa viruso ! Ĝi putrigis al ni la vivon, devigante nin reimagi nian ĉiutagaĵon, modifi niajn projektojn, ekmovi nian penson, eĉ niajn certecojn...

Tiam adiaŭ al la trairo de Pireneoj, pli poste al la malkovro de katarata pado kun la espero, ke la viruso elradikiĝos la venontan jaron. Ĉar kvankam la vojeto povas esti irata kun sereneco (la kovim ne gvas nin post ĉirkaŭvojo), la intermiksateco en la dormejoj, sanitariaj instalaĵoj, la refektorio instigas nin al la singardemo.

Sed urĝis, ke mi reekzercigas miajn artikojn. Sola foriri en la montaro ne estas singarde. La sorĉaĵa besteto malpersvadas min veturi per trajno ...la solvo : nia kamioneto !

Pli bone ol transveturigi dorsosakon de haltejo al alia!

Mi havas la rifuĝejon nur por mi, kie kaj kiam mi volas ĝin ! Rifuĝejo por mi kun la tuta komforto (la kamionetantoj komprenas min) sed pli bone ol en dormveturilo. Tiu igus min simila al turisto promenanta kiel la « pilgrimturisto » (miksado inter turisto kaj pilgrimanto) nova vorto pri dimanĉaj marŝantoj, kiuj promenas sur la vojetoj de Sankta Jakobo profitante de loĝejoj kaj petas ĉiam pli da komforto...kiu estas ofertata al ili. Jam mi skribis tion en mia rakonto pri marborda vojo en 2018)

Mi ne konas Bretonion, krom Breston. Mi rigardas mian kolekteton da maplibretoj : rondiro ĉirkaŭ la Montoj de Arrée kaj la duoninsulo de Crozon (2004) kaj la alia pri marbordo kaj la insuloj de Morbihan (2016).

Antaŭ kelkaj jaroj mi bezonis malkovri Bretonion sed miaj ŝuaĉoj direktis min al aliaj lokoj. Ripari tiun eraron estas nun.

Mi elektas Morbihan kun foriro el Lorient. Celo : la duoninsulo de Quiberon.

Nun ni devas atendi, gvasi la plej bonan meteobultenon. Mia saketo estas preta, 3,5 kilogramoj kun la akvo, neniam portita !

Sabaton la 19an de septembro.

Jen ni do forveturis kun Ann Mari stiranta, al la malkovro de Morbihan por kamionetoekskurso aŭ komforta migrado.

Kiam ni forlasas Turon, la ĉielo estas griza, plena, je pluvo, kiu ne evitos nin ĝis Nantes.

Sed kiam ni alvenis al Lorient la ĉielo elektis, en sia paletro de bluaj koloroj, bebovestaran bluan kaj la mildecon, kiu akompanas ĝin... estas Bretonio ! Mi uzas alian vojeton de granda migrado en Pen Mahé, aliflanke de Blavet, braketo de maro, por eviti la trairon de Lorient (12 km tra la urbo, la submara bazo, la fiŝhaveno....)

Lorient estas



urbego kiu meritas nian atenton anstataŭ ol trapasi tro rapide.

Ni promenos en la urbo Locmiquélic, poste ni elektas Sainte Catherine, malgranda vilaĝo marborde. Ni promenos sur la haveno, unua biero.

Mi rimarkas la komencon de la vojeto apud la enŝipejo dum Ann Mari serĉas la interesajn lokojn, kiujn ŝi vizitos, dum mi piediros.

Dimanĉo, 12 km.

Tiun matenon, nebula sed milda vetero. Unua promenadeto de 4 km tra la kamparo por atingi la vojon de granda migrado. Unuaj tipaj dometoj kun anguloj kaj fenestrobretoj el granita ŝtono. Estas dimanĉo. La vojeto estas okupata. Promenantoj, kurantoj, biciklantoj dividas la vojeton. La geuloj salutas sin reciproke, interŝanĝas kelkajn vortojn, eĉ

la biciklantoj estas ĝentilaj, ne trudpasas. Mi ankaŭ renkontas ĉasistojn, kun kiuj mi interŝanĝos kelkajn vortojn.

Unu, la spaniolo ŝajnas serioze pritrakti ĉi tiun aferon, kun la nazpinto ternivele serĉanta neatentitan sovaĝan kuniklon. La alia, speco de hirta grifono, estas pli trankvila, (ĝi atendas, ke la neatenta kuniklo venas al ĝi) kiel lia mastro malgranda dikulo kun okulvitroj kaj senordaj haroj, montrata rideto, ĉiam joviala. Lia amiko estas pli ŝika, pli pripensema. Estas li, kiu parolas, li scias ĉion pri ĉio. Certe emerita profesoro. Malpezpaŝe mi piediras sur malgrandaj vojoj, trairas vilaĝetojn, ĉirkaŭiras gallo-romanajn ruinojn. Mi ankaŭ laŭiras parcelojn de kulturoj de legumenacoj, poreoj, florbrasikoj, karotoj, blitoj kaj artiŝokoj ! Ĉi tie la tero estas de nigra koloro kaj fekunda.

Mi retrovas Ann Mari en Kerzine. Promenadeto en Plouhinec, naskiĝurbo de Germaine Tillon, brava rezistantino. Poste ni marŝos en la maro. Ni tranoktos en Plouhinec, trankvila parkejo apud la centro, proksime sanitariaj servoj.



Lunde, 19 km

Ĉi nokte pluvis kaj ĉi matene la vetero estas moroza. La ĉielo estas nuboplana, lakteca kaj nenio bona estas anoncita. La tago pasis en la grizaĵo sed de tempo al tempo la suno tamen transpasas la nuban mason por doni al ni bonvolan dolĉecon. La marborda vojo estas kota. Ĝi superas marbrakon, kiu evoluas laŭ la ritmo de la tajdoj kaj kie la ostraj parkoj estas abundaj. Ann Mari atendas min en Pont-Lorois, ĉe la piedo

de ponto kiu transiras la riveron de Etel, por la tagmanĝo.

Mi piediros poste sur la marborda vojeto, de kreko al kreko kaj la panoramo al « la barre de Etel » kaj la elfluejo de la Ria sub bela ĉiellumeco estas mirindaj.

Poste ni retrovos nin en Erdeven sed iros parki por tranokto en Etel, ĉe la marbordo. Perkamioneta ekskurso estas simila al komforta ekskurso !

Tial ni piediros por malkovri 2 kilometrojn for la insuleton de Saint-Cado kaj ĝian fontanon kun piedoj en la akvo, ĝian etan preĝejon de la 19a jarcento, malnova komandorejo de la templanoj.



Marde, 18,5 km

Hieraŭ vespere ni ĉeestis la manovron de la « Louise » dum ĝia ŝnurligado kaj tiun matenon la bela velŝipo foriris.



Ni malhastas bazarumi. En Etel, ĉi tiu loĝanto preferas la flavan koloron.

Ann Mari revenigas min tien, kie ŝi lasis min hieraŭ. La



vetero estas bona, la suno estas abunda. La malo de hieraŭ. Forlasante la vilaĝeton mi trairas la ĉirkaŭaĵon de la parko, pasante sub monumenta portego.

En la fundo de la parko, ĉirkaŭita de ĉirkaŭfosaĵoj mi ekvidas la kastelon, kiu ankaŭ havas gastĉambrojn. La vojeto estas plaĉa tra la kamparo, la arboplantitaj spacoj estas prisemitaj de akvoebenoj kaj kompreneble, kiam la dolmenoj ne estas starigitaj centre de la vilaĝo, ili tronas ĉi tie kaj tie, solaj en angulo de kampo aŭ kolektitaj laŭ pli malpli zorge preparita maniero.



Tagmanĝo apud lageto de Varquès. Poste mi estas en Sainte Barbe, domareto, kiu konservis kun siaj mallarĝaj stratetoj sian aŭtentikecon (multe pli bela ol ĉiuj vilaĝoj stampitaj "plej belaj vilaĝoj en Francio", kiuj ĉiuj similas).



Iom flanke, fontanoj, lavujoj kaj kapelo kun diskreta stilo sed kiu posedas vitralon prezentantan batalon inter la Vendeanoj kaj la « bluuloj dum la revolucio.

En ĉi tiu loko troviĝas la vojkuniĝo de la du branĉoj de la granda migrado 34. Forkvojo al Carnac aŭ al la duoninsulo de Quiberon, kie la vojparto faras buklon de 55 km.

Mi preferas la ĉirkaŭvojon tra Quiberon.

La malgranda tervojeto rapide malaperos por sekvi rektlinie sur deko da kilometroj dividitan vojon, sur kiu mi estos tute sola. Ĉe la najbaraĵo de la departementa vojo kaj de la ununura fervojo, sur kiu la SNCF igas siajn trajnojn veturi nur dum somero, troviĝas granda muzeo de la vendeana ribelo, kiu memorigas ĉi tiun sengloran paĝon de nia historio. Mi transpasas ĉi tiujn du ruliĝantajn aksojn.

Jen mi estas en la golfeto de Plouharnel, rapide



marŝante en preskaŭ dezerta zono, poste ŝtatarbaro, kie kampadejoj sin sekvas. Baldaŭ la unuaj domoj de Penthievre kaj mi laŭiros la marbordon sed okcidentflanke. Mi retrovas Ann Mari ĉe la piedo de la fortikaĵo tuj post la istmo de Penthievre. Ŝi havis tempon por viziti tiun militan fortikaĵon kaj ŝi rakontos al mi ĝian historion. Ĝi apartenas nun al la 3a MIR (MarInfanteria Regimento) de Vannes. Estas loko por milita instruado kaj atak-trejnado. Kaj oni vidis la militistojn trejniĝi kaj grimpadu la fortikaĵojn. Steleo memorigas, ke 59 rezistantoj estis mortpafitaj dum la dua mondmilito. Bela promeno kun malvarmetiĝo, kies sekreto havas Bretonio.

Diskreta pluveto, kiu malfacile falas, kun gracieco, kiu prenas sian tempon por iomete malsekigi vin sed tiel utila al la moviĝanta korpo.

Unuvorte, la homoj de malsupra Francio kun siaj ŝprucigiloj sur kafejaj terasoj inventis nenion.

Ni trovos inter 3 domveturiloj lokon por la kamioneto en Kerhostin, sur malgranda diskreta sabla parkejo fronte al la maro.



Ni povos ankoraŭ ĝui nian preferatan agadon... Marŝi kun la piedoj en la akvo ĝis la vetero fariĝos kaprica.



Merkredo, 20 km


Pluvego tiun nokton. Sed jam la vento balaas la lastajn nubojn, kiuj obstrukcas la ĉielon. Ŝajnas skribite, ke mia pluvjako ne forlasos mian dorsosakon kaj mi surmetis la gamaŝojn nur

unufoje, por protekti min kontraŭ la roson dum la trairado en la erikejo. Hieraŭ, oriente, la maro retiriĝante malkaŝis grandajn plaĝojn el fajna sablo. Hodiaŭ, okcidente de la duoninsulo estas ĉi tie nur granitaj klifoj kaj krutaj rokoj. Mi sekvas padon apenaŭ desegnitajn sur ĉi tiu minerala grundo ĝis Port Goulom, kie la granda migrado forlasas la marbordon kaj reprenas la direkton orienten ĝis la semaforo de Locmaria. En la haveno Haliguen, kie laboroj okazas, mi retrovas Ann Mari. Ni iros manĝeti sur parkejo, kiu superas la oceanon.




Neniam la sako estis tiel facile renversebla sur la ŝultroj. Denove la pado desegniĝas sur la granitaj grundoj, kie blovas la vento. Tiam post la pinto de Conguel estas la sovaĝa marbordo, kiu bone meritas sian nomon. Krutaj klifoj, klarakvaj golfetoj sin sekvas. Ĉi tie ne plu signalizita pado sed nur ŝero. Quiberon estas videbla. La kazino, la instituto de marakva kuracado, la plaĝo, mi vidas la kamioneton saĝe parkitan en la urbocentro. Mi atendos Ann Mari, kiu devas promeni en la urbo. Ambaŭ ni malhastas por malkovri Quiberon, banurbeton malĝojan pro foresto de turistoj kaj granda malespero de komercistoj. Ni aĉetados ĉe la fiŝvendejo Lucas (kiu vendas siajn produktojn en sakoj sub vakuo tra Francio). Ĉi vespere, ni manĝos fiŝsupon. Poste ni iros al nia parkejo nokte. Mi vidis ĝin, kiam mi alvenis al Quiberon ne malproskime de la kazino. Ĉi tie estas kelkaj aŭtoj, kutimuloj

venas por ĝui la spektaklon de la maro en la unua plano kaj la sunsubiron ĝis la horizonto. Baldaŭ ĝi lumigos la ĉielon kaj estingos la tagon.



Tiam nokte ni restas solaj kun la klakado de ondoj sur la rokoj, laŭ la ritmo malpli kaj malpli hakata kun la malfluso komenciĝanta. En la nigra nokto nur la ventosimfonio ludos siajn lastajn notojn.



Jaŭdo, 6 km

Ĉi matene mi foriras kun malpli da entuziasmo, ĉar la fino de la vojaĝo estas antaŭskribita. Sekvante la marbordon mi reatingas Port Goulon, kie Ann Mari retrovas min. Mi finfaris la ĉirkaŭiron de ĉi tiu terfino, kiu estis malnovtempe insulo, antaŭ ol ĝi estas kunligita sub la efiko de marfluo al la kontinento per ĉi tiu mallarĝa sabla strio de 22 metroj en ĝia plej mallarĝa parto (la istmo de Penthievre). Aĝrablega migrado. Kompreneble la laceco, la sana laceco evakuata post duŝo kaj dormeto, tute ne sentiĝas. La etapoj estis mallongaj, sen niveldiferenco. Tiu granda migrado farendas komence de la sezono, por varmigi la surojn antaŭ

ol alfronti la montaron, aŭ en septembro por refortiĝi.



Oni atingos la vilaĝon Sainte-Barbe, kiun mi deziris malkovrigi al Ann Mari.

Oni sidiĝas por tagmanĝi, kiam subite kelkaj dikaj gutoj de pluvo kunpremiĝas sur la kapoton de la kamioneto. La granito, kiu antaŭ momento trembrilis, fariĝis tre senbrila sub ĉielo rapide pli malheliĝanta. Rapide oni retrovas la kamioneton kaj finas nian manĝon.



Sub la pluvo ni revenos al Turlando.
Bela estas ĉi tiu Bretonio kun siaj pitoreskaj vilaĝoj, kie estas burĝaj domoj apud modestaj domoj kalkitaj, la stranga etoso de malgrandaj havenoj nestintaj en ĉiu golfeto de la marbordo, siaj vilaĝetoj kun diskreta ĉarmo kaj siaj mar- kaj ĉielbluoj kun konstante ŝanĝiĝantaj koloroj sub la efiko de la vetero.



Oni diras, ke ĉiam pluvos. Ni forgesas diri ankaŭ, ke la vetero estas bela ĉiutage (inter du ekpluvegoj)...estas la magio de Bretonio. Estis vere ĉi semajne de septembro. Mi restas sur ĉi tiu impresio.

Tial ni revenos !

Mi reprenos la grandan migradon, kie mi forlasis ĝin aŭ eble en Penthievre por iri per vojeto ne signalizita laŭ la granda strando ĝis Sainte-Barbe kaj Ann Mari, mia gastama Bonvolemlino de mia ruliĝanta gastejo malkovros aliajn lokojn ĉiujn similajn sed ĉiujn unikajn, aliajn malgrandajn lokojn kun Bretona ĉarmo

Ĝis revido kaj dankon.

AMUZAJ RAKONTOJ

Ĉi tie parolatas ĉiuj lingvoj

Rusa turisto vojaĝis en Francio. Ĉe la pordo de granda hotelo estis skribita : Ĉi tie parolatas ĉiuj lingvoj .

Li demandis ruse la hotelestron :

« Ĉu vi havas liberan dormoĉambron ? »


La hotelestro ne respondis.

La Ruso demandis angle, poste germane, sed la estro ankoraŭ ne komprenis. Fine la turisto demandis france :

« Kiuj parolas ĉiujn lingvojn ĉi tie ? »

La estro kviete respondis : « La vojaĝantoj ».

Historio pri psikiatro



La paciento :

Doktoro, mi havas problemon. Ĉiuvespere, kiam mi estas en la lito mi havas la impreson, kvazaŭ iu estas kaŝita sube.

Tiam mi leviĝas por rigardi sub la lito, kaj evidente estas neniu.

Mi reenlitiĝas sed post momento mi diras al mi, ke eble mi ne bone rigardis.

Tiam mi reellitiĝas por kontroli denove, evidente sen rezulto. Unuvorte, kvankam mi diras al mi, ke tio estas stulta, mi ĉiam sentas la bezonon certigi, ke neniu estas kaŝita sub la lito. Kaj la afero daŭras tutnokte ! Doktoro, ĉio ĉi venenas mian vivon, ĉu vi povas fari ion ?

La psikiatro :

Hm!... Mi komprenas...kompulsa obsedato...

Antaŭvidu psikoterapiajn interparolojn dum kvar jaroj, po tri seancoj ĉiumonate kaj mi liberigos vin de via obsedo.

La paciento :

Sed kiom tio kostos al mi, Doktoro ?

La psikiatro :

60 eŭrojn por ĉiu seanco, do 180 eŭrojn monate, 2160 eŭrojn jare kaj finfine 8640 eŭrojn.

La paciento pensema :

Hm! Mi kredas, ke mi estas pripensonta.

Ses monatojn poste la psikiatro hazarde renkontas la ulon sur la strato :

La psikiatro :

Nu, kial vi neniam revenis viziti min ?

La paciento :

Ĉar... 8640 eŭroj... dum mia picoliveranto solvis mian problemon nur por 30 eŭroj.

La psikiatro ofenditita :

Via picoliveranto ? Ĉu vere ? Kiel li faris ?

La paciento :

Li konsilis al mi segi la piedojn de mia lito.

Agrablan tagon, Doktoro.